
# 39a PSI

printempa semajno internacia

germana esperanto-asocio

https://psi.esperanto.de



la paska renkontiĝo por la tuta familio

## Wittenberg

3-a de aprilo – 10-a de aprilo 2023

Germanio

# Bonvenon en Wittenberg

## kaj al la 39-a PSI

Ĝeneralaj Informoj ........ 2
Por via libertempo ........ 3
Surloke ........ 4
Esperanto-kursoj ........ 4
Salonoj / Programeroj ........ 5
Prelegoj ........ 5
Kursoj ........ 9
Ludoj ........ 11
Filmoj ........ 11
Gimnastikoj, Sportoj kaj Dancoj ........ 13
Diservoj ........ 14
Infana Programo ........ 15
Ekskursoj ........ 18
Vespera Programo ........ 26
Listo de Partoprenantoj ........ 27
Helmut Klünder ........ 30
PSI-historio ........ 31

# Ĝeneralaj Informoj

## Adreso de la ejo

DJH Jugendherberge Wittenberg
Schlossstraße 14/15
06886 Lutherstadt Wittenberg
Tel: +49 3491 505205
(germanlingve)
www.diejugendherbergen.de

## Nia akceptejo/oficejo

Nia oficejo post la unua tago situas en salono **oficejo** (ĉambro107) kaj estas regule malferma post la manĝoj, sed ankaŭ ofte laŭokaze. Vi povas pagi tie vian kotizon, aliĝi al ekskursoj, peti materialon, raporti problemojn ktp.

## Organiza Teamo

**Ralf & Zoja Haumer**
gvidado, programo, broŝuro

**Stefan Krieghoff**
administrado, financoj, retejo

**Heike Buhr & Georg Weil**
ekskursoj

**Laura Klünder**
retejo

## Telefonnumero:

Se vi bezonas helpon de la organiza teamo, vi povas el Germanio senkoste alvoki ĉi-tiun numeron:

**0800 3 36 36 36 62**

Aŭ rekte alvoku la poŝtelefonon de Ralf H.:

**+49 1520 1718060**

## Manĝoj

07:00 - 09:00 h matenmanĝo
12:00 - 13:00 h tagmanĝo
18:00 - 19:30 h vespermanĝo

## Fumado

Bonvolu atenti, ke la fumado estas permesita nur ekstere.

## Forveturo

Ni petas vin malplenigi kaj forlasi vian ĉambron je la lasta tago ĝis la 10-a horo.

## Programo

La programo sekvas la tradician skemon:

antaŭtagmeze: labora programo

posttagmeze: ekskursoj

vespere: distra/kultura programo

Krom la fiksita programo okazas diversaj laŭokazaj rondoj kaj programeroj. Se vi mem deziras aldoni programeron, simple anoncu tion al la organizantoj.
La definitivan programon vi ekscios el la ĉiutagaj afiŝoj ĉe la enirejo.

## Teknikaĵoj

Se vi havas teknikajn bezonojn aŭ demandojn por prelegoj aŭ spontanaj okazoj, bonvolu turni vin al **Ralf Haŭmer**.

Prefere anoncu vian bezonon frue, por ke vi certe ĝustatempe ricevu kion vi bezonas.

# Por via libertempo

## Libroservo

salono situas apud
**akceptejo** (0)

La libroservo de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL) estas malferma ĉiutage. Prizorgas ĝin Gerd Jacques.

## Trinkejo

salono **Manĝejo** (0)

La trinkejo/kafejo funkcias ne nur vespere, sed ofte ankaŭ je aliaj tempoj. Ĝi ofertas trinkaĵojn kun kaj sen alkoholo, kafon, diversajn teojn kaj frandaĵojn. Prizorgas ĝin Christine Brücker

## Spontanaj rondoj

Se vi sentas la bezonon iniciati iun programeron ekster la skribita programo, ekzemple ludon, muzikan rondon, kantgrupon ktp., bonvolu turni vin al la organizantoj.


Laŭeble ni havigos al vi salonon por via programero. La junulargastejo ankaŭ volonte pruntos al vi diversajn ludojn kaj aliajn ilojn.

# Surloke

Wittenberg, esperante Vitenbergo, estas urbo de la germana federacia lando Saksio-Anhalto. Ĝi situas apud la rivero Elbo, kaj estas la administra centro de la distrikto Wittenberg. Fine de decembro 2015 la urba komunumo havis 46.475 loĝantojn. Wittenberg estis grava urbo de la iama duklando Saksio-Wittenberg (ĝis 1356) kaj poste de la elektoprinclando Saksio (ĝis 1806). La 31-an de oktobro 1517 Martin Luther metis siajn Naŭdek kvin Tezojn al la pordego de la centra preĝejo de Wittenberg, lia protesto kontraŭ la korupteco en la katolika eklezio.

En 1996 UNESKO registris la lokojn de Lutera agado en Eisleben kaj Wittenberg en la listo de Mondaj Heredaĵoj.

La junulargastejo Wittenberg estas parto de la kastelkonstruaĵo, la estinta duka rezidejo de Friedrich la saĝulo (Friedrich der Weise), kaj troviĝas nur kelkajn metrojn for de la kastela preĝejo kun la Lutera teza pordo. Tie atendas vin moderna atmosfero en historiaj muroj. For de la strata bruo, sed tamen en la koro de la historia malnovurbo, la junulargastejo estas la ideala elirpunkto por atingi/esplori la historiajn lokojn kaj konstruaĵojn de Wittenberg piede. La junulargastejo havas 153 litojn (2- ĝis 6-litaj ĉambroj, 5 senbarierajn), ĉiuj ĉambroj havas necesejon kaj duŝon. La ĉambroj en la unua kaj dua etaĝo estas atingeblaj per lifto. La seminariejoj en la teretaĝo, la kafejo, akceptejo kaj la manĝejo estas komforte atingeblaj sen barieroj. Pliaj ofertoj de la domo estas malgranda biblioteko kaj granda vitra vestiblo por babili



# Esperanto-kursoj

| | | |
|---|---|---|
| E1 | Kurso por Komencantoj<br>Elementa E-kurso por komencantoj laŭ la germanlingva libro «Tesi, la testudo» | Wolfgang Loose<br>salono **Justus Jonas/ S6**<br>(2) ĉiutage<br>10:35-12:15 |
| E2 | Kurso por Progresantoj<br>Se vi jam komencis lerni Esperanton aŭ enuas en la kurso por komencantoj, venu ĉi-tien por progresi. | Alex Humet<br>salono **Justus Jonas/ S6**<br>(2) ĉiutage 9:00-10:30 |

# Salonoj / Programeroj

| etaĝo | nomo | | 7:30 – 8:00 | 9:00 – 10:30 | 10:45 – 12:15 | 19:00 – 20:00 | 20:00 – 21:30 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 0 | S 0 | vitra enirejo | stofkolorigado | | | | |
| 0 | S 0 | apud akceptejo | libroservo | | | | |
| 0 | S 1 | Martin Luther | laŭdo | kursoj | sporto | vespera programo | |
| 0 | S 2 | Lucas Cranach | manlaboro | | | | |
| 1 | S 3 | Johannes Bugenhagen | | Mazi | ŝako | piĵamrakontoj | |
| 1 | S 4 | Friedrich der Weise | | prelegoj | prelegoj | | |
| 1 | S 5 | Philipp Melanchthon | | prelegoj | prelegoj | | |
| 2 | S 6 | Justus Jonas | | kursoj | kursoj | | |
| 2 | S 7 | Katharina von Bora | sportejo | | | | |
| 2 | S 8 | Spielezimmer | ludĉambro | | | | |
| 1 | | ĉambro Nr.107 | oficejo | | | | |

# Prelegoj

## Pr1 Bauhaus-arkitekturo

Tiu prelego estos kvazaŭ enkonduko kaj informo pri la vidota Bauhaus-arkitekturo kaj ties fono kaj fontoj.

Peter Kühnel
salono **Philipp Melanchthon/ S5**
(1)
mardo 4.4. 9:00

## Pr2 Biciklu kun BEMI

Pri nuntempaj aktivaĵoj de BEMI

En BEMI, la faka sekcio pri biciklado de TEJO, aperas pli kaj pli da aktivaĵoj.
Biciklaj karavanoj dum ĉiuj sezonoj, pluraj BEMI-semajnoj jare, unutagaj BEMI-ekskursoj en diversaj landoj - la Biciklista Esperantista Movado Internacia havas nun programon por ĉiuj, de facilaj ekskursoj ĝis la ekstrema Paris-Brest-Paris dum 90 horoj. Kaj ĉion ĉi en Esperanto.
Vidu kio okazas, eksciu kiel venigi BEMI-eventon al via loko, kaj miru pri planoj kaj revoj por la estonteco.

Lars Sözüer
salono **Philipp Melanchthon/ S5**
(1)
mardo 4.4. 10:45

## Pr3 Trajnvojaĝo al la 107-a UK

**André Weber**
salono **Philipp Melanchthon/ S5** (1)
ĵaŭdo 6.4. 9:00

Pasintsomere mi sukcesis kombini kvar belajn kaj interesajn eventojn en unu vojaĝo.
Unue mi vizitis la urbon Vancouver en la sudokcidento de Kanado. Tie mi inter alie biciklis ĉirkaŭ la parko "Stanley Park", uzis la pramŝipetojn "Aquabus" kaj migris en la valo "Lynn Canyon Park". Krome mi uzis la senŝoforan metroon "Skytrain" kaj la transhavenan pramŝipon "Seabus".
Lunde tagmeze, post adiaŭa tagmanĝo en la turniĝanta restoracio de la televida turo "Vancouver Lookout", mi eniris la faman, transkontinentan trajnon "The Canadian". Per ĝi mi dum kvar tagoj kaj noktoj ĝuis la belan pejzaĝon kaj trifoje ĉiutage tre bongustajn pladojn en la restoracio-vagono. Kaj la plej bona sperto estis la tre interesaj babiladoj kun tre diversaj homoj. Multaj el ili la unuan fojon aŭdis pri Esperanto kaj montris ioman intereson. La plej granda kaj ĝojiga surpizo estis, ke mi en la trajno renkontis sinjoron Namba el Yokohama (Japanio), kiu ankaŭ vojaĝis al la UK.
La Universala Kongreso en Montreal ofertis al ni – kiel kutimas - abundan, varian kaj plenŝtopitan programon. Dum piedmarŝo tra la apudhavena urbocentro mi aŭdis multajn informojn pri la historio de la urbo kaj dum alia duontaga ekskurso mi lernis multon pri metrooj. Ĉiuvespere okazis kultura program. La teatraĵo "1910" kaj diversaj dancprezentaĵoj tre plaĉis al mi.
Ĉion tion kaj multajn pluajn faktojn, impresojn kaj fotojn mi prezentos dum mia lumbildprelego.

## Pr4 Lingva terapio de la menso de lernantoj kun milda intelekta neplenkapablo

**Jerzy Leyk**
salono **Friedrich der Weise/ S4** (1)
ĵaŭdo 6.4. 9:00

Eksperimenta pilota projekto en bazlernejo
Lernantoj kun intelekta neplenkapableco je milda grado devige lernas en bazlernejo en Pollando unu fremdan lingvon. Plej ofte la

anglan. Unuflanke rezultoj de tiu lernado estas tre mizeraj kompare kun intelekte plenkapablaj lernantoj kaj duaflanke lernado de pli facila fremda lingvo kaze de malpli kapablaj personoj montriĝas aparte mensoevoluiga.
Baze de tiuj premisoj por plialtigi mensajn kapablojn de la lernantoj la fondaĵo „Centro pri Plurlingvismo kaj Interkultura Komunikado – PLURIKO" lanĉis en septembro 2022 pilotan projekton en la 4-a klaso de speciala lernejo en Piaseczno apud Varsovio.
La projekto havas du partojn:
a) edukan: lernado de esperanto kiel aldona studobjekto far grupo da lernantoj dum du jaroj;
b) sciencan: mezuri efikojn de la nivelo de lingvokapabloj pri la pola, angla kaj esperanto, mezuri la evoluon de intelekta nivelo kaj kognitiva funkciado, mezuri la evoluon de la cerbo pere de magneta resonanco – komence de la eksperimento kaj post 2 jaroj.
Unu el la nunaj defioj estas trovi kaj aranĝi por tiuj gelernantoj adekvatan someran restadon kun alietnaj gekolegoj uzantaj aŭ lernantaj esperanton.

## Pr5 La angla kaj Esperanto en komparo

Lu Wunsch-Rolshoven
salono **Martin Luther/ S1** (0)
ĵaŭdo 6.4. 10:45

La tradiciaj argumentoj por Esperanto estas konataj: Lernebla en kvarono de la tempo por la sama nivelo de ekzemple la angla. Pli da kultura egalrajteco.
Tamen multaj homoj opinias, ke la angla simple venkis kaj do sendepende de argumentoj ne indas okupiĝi pri Esperanto. La praktiko montras tamen, ke la angla ne atingis la celojn de Esperanto: Laŭ aktualaj nombroj la procentaĵo de anglaparolantoj en la mondo ne plu kreskas, sed ŝajne stagnas ĉe 30%. En landoj kiel Japanio nur proksimume 15% sukcesis lerni la anglan sufiĉe bone - supozeble pro la grandega lingva distanco inter la angla kaj la japana. Krome la anglalingva literaturo estas ĉefe verkita de

angladenaskuloj - ĉu tiel estu ĉe "internacia" lingvo? Ni rigardu la faktojn kaj pridiskutu ilin.

| | | |
|---|---|---|
| Pr6 | Imuneco<br>La prelego pri imuneco klopodas doni superrigardon de la strategioj de la korpo por defendi sin kontraŭ malamikaj atakoj fare de mikroboj aŭ aliaj fremdaĵoj. | Ite Tytgat<br>salono **Philipp Melanchthon/ S5** (1)<br>vendredo 7.4. 9:00 |
| Pr7 | Klimata justeco kaj intersekcieco<br>La klimata krizo estas granda danĝero por nia mondo. Sed ĝi ne nur kaŭzas ekologiajn problemojn, pri la krizo ankaŭ aliaj maljustecoj kreskas. En la batalo kontraŭ la klimata krizo ni tial ankaŭ devas atenti la rilatojn inter socialaj kaj tutmondaj maljusteco. Kaj la nunaj maljustecoj ankaŭ gravigas la klimatan krizon. Tial oni devas paroli pri tio grava postulo de klimataktivismaj movadoj mondvaste. | Paula Weil<br>salono **Friedrich der Weise/ S4** (1)<br>vendredo 7.4. 9:00 |
| Pr8 | Diskuto: Esperanto en la klimatkrizo<br>Kiun rolon ludos Esperanto en la akriĝanta klimatkrizo. Pri kio ni prepariĝu en la venonta jardeko. | Wolfram Diestel<br>salono **Friedrich der Weise/ S4** (1)<br>vendredo 7.4. 10:45 |
| Pr9 | Projekto Reta Lernejo<br>La projekto Reta Lernejo (reta-lernejo.de) celas komprenigi bazajn konceptojn de diversaj fakoj per interagaj retpaĝoj. | Wolfram Diestel<br>salono **Philipp Melanchthon/ S5** (1)<br>sabato 8.4. 9:00 |
| Pr10 | VeloRelo - projekto pri bicikloj en trajnoj<br>Kunpreni sian biciklon en trajno al alia urbo, eble eĉ al alia lando, tio estas ideala maniero vojaĝi daŭripove. Sed kiel trovi trajnkonekton, kiu akceptas biciklojn? Kia bileto necesas? Kiel aĉeti ĝin? Jen demandoj ofte tre malfacilaj.<br>Komuna projekto de BEMI (faka asocio pri biciklado) kaj IFEF (faka asocio pri fervojo) havas la ambicion provizi al la publiko respondojn en fidinda kaj utila maniero. Kaj samtempe pruvi, ke | Lars Sözüer<br>salono **Friedrich der Weise/ S4** (1)<br>sabato 8.4. 09:00 |

Esperanto bone taŭgas por internacia kunlaboro. Konatiĝu kun la planoj por VeloRelo, la nuna stato de la projekto, kaj kiel vi povas kontribui al ĝia sukceso.

Pr11 Vitaminoj kaj nutrado
Mi volas doni superrigardon iom pli detale pri la vojo de manĝaĵoj ek de la momento kiam ili envenas la korpon kaj iom paroli pri la rolo de vitaminoj en la tuto. Ankaŭ mi listigos iom da manĝaĵoj, kiuj alportas la vitaminoj en la korpon.

Ite Tytgat
salono **Philipp Melanchthon/ S5** (1)
sabato 8.4. 10:45

Pr12 Uzi sovaĝajn plantojn kiel nutraĵo
Ĉu vi sciis, ke tre multaj de la sovaĝaj plantoj utilas por manĝi kaj tre facile, preskaŭ ĉie troveblas? Ĉu ankaŭ vi ŝatus kelkfoje uzi trovaĵojn de via promeno en via manĝo kaj tiel eble eĉ eviti iun similan aĉeti en vendejo?
Venu kaj lernu ekkoni kelkajn de la oftaj, nun troveblaj plantoj kaj ĝeneralajn receptojn, kiujn eblas prepari kun ili.
Se la vetero sufiĉe bonas, ni volas ne nur kune lerni kial kaj kion oni povas kolekti kaj uzi, sed ankaŭ eliri promeni en la ĉirkaŭaĵo por malkovri kiom da uzebla verdaĵo troveblas ankaŭ en urbo.

Aike Müller kaj Lode van der Velde
ekstere
sabato 8.4.10:45

# Kursoj

K1 Ŝtofkolorigado
Per ŝablonoj ni kune kolorigos saketojn, T-ĉemizojn ktp.

Georg Weil
salono **vitra enirejo** (0)
diversaj tagoj 9:00

K2 Ekspozicio de portretoj kaj libroj kaj artkurso "Ni desegnas"
La 5 librojn kun la titolo "Esperanto por mi, 16 geesperantistoj portretitaj de Helga Plötner" estas eldonitaj pere de la eldonejo Horizonto el Japanio. La libroj n-ro 4 kaj 5 estos ankoraŭ

Helga Plötner
salono **Martin Luther** (0)
mardo 4.4.
9:00 - 11:00

donace haveblaj. Ŝi montros originalajn portretojn de tiuj libroj.
Helga disdonos por artkurso materialojn: paperon, kajeron kun blanka papero, krajonojn, buntajn krajonojn kaj skrapgumojn.
Invitataj estas infanoj kun familianoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj.
Ne timu, Helga gvidos vin humorplene al sukcesaj rezultoj.
Venu kuraĝe kaj ne forgesu vian okulvitron, kiam vi bezonos tiun.

K3 **Akrobataĵoj**

Jascha kaj Tobi faras akrobataĵojn kun vi kiel vivantaj piramidoj.
Ĉiu povas partopreni de juna ĝis maljuna. Ekde la aĝo de tri jaroj. Ne estas aĝolimo. Homoj simple devus senti sin kapablaj.
La partoprenantoj bezonas komfortajn vestojn kaj bonan humoron.

Tobias kaj Jascha Menzel
salono **Philipp Melanchthon/ S5** (1)
ĵaŭdo 6.4. 10:45
salono **Martin Luther/ S1** (0)
vendredo 7.4. kaj sabato 8.4. 10:45

K4 **Ĵonglado**

Kurso por komencantoj kaj progresantoj. Ĉiu povas lerni ĵongladon!

Klaus Rumrich
salono **Martin Luther/ S1** (0)
diversaj tagoj 9:00

K5 **Ĉina ŝako**

Ĉina ŝako estas ludo el antikva Ĉinio. Verŝajne nia "okcidenta" ŝako devenas de Ĉinio. Kelkaj ludpecoj moviĝas same kiel en nia ŝako.
Do, ŝakludistoj havas avantaĝon en lernado.

Hans Jäger
salono **Johannes Bugenhagen/ S3** (1)
mardo 4.4. 10:45
ĵaŭdo 6.4. 10:45
vendredo 7.4. 10:45

K6 **Origami**

Ni praktikos fascinan paperfaldadon de diversaj belaj ensorĉantaj objektoj.

Zoja Haumer
salono **Lucas Cranach/ S2** (0)
ĵaŭdo 6.4. 9:00
sabato 8.4. 9:00

# Ludoj

L1 **Nigraj rakontoj**
Ĉu vi ŝatas enigmojn aŭ estas hobia detektivo? Venu al la programero pri nigraj rakontoj kaj eltrovu pri amuzaj, strangaj aŭ frenezaj mortmanieroj.

Carolin Weemeyer
salono **Friedrich der Weise/ S4** (1)
vendredo 7.4. 19:00
sabato 8.4. 19:00

L2 **Ludposttagmezo**
Mezepokaj kaj aliaj ludoj por ĉiuj

Ralf Haumer
salono **Martin Luther/ S1** (0)
dimanĉo 9.4. 14:30

L3 **Konstruado de paperturoj**
taŭgas por infanoj kaj plenkreskuloj
Celo estas, konstrui kiel eble plej altan paperturon uzante nur unu DIN A4 folion. (konkurso)

Klaus Rumrich
salono **Friedrich der Weise/ S4** (1)
mardo 4.4. 10:45

L4 **So Kleever!**
Prezentado de nova ludo tradukita en esperanto

Aike Müller
salono **Friedrich der Weise/ S4** (1)
ĵaŭdo 6.4. 10:45

L5 **Nova tabulludo por infanoj**

Lode van de Velde
salono **Friedrich der Weise/ S4** (1)
vendredo 7.4. 10:45

# Filmoj

F1 **1945**
Dramo | Vivo en postmilita vilaĝo ŝanĝiĝas por ĉiam post alveno de du stranguloj.
(2017, Hungario, 91min)

salono **Philipp Melanchthon/ S5** (1)
lundo 3.4. post la vespera programo

F2 Filmo de TEJO "June Kaj Kune"
En la Internacia Junulara Kongreso povas okazi ĉio ajn… foje eĉ ĉio samtempe! Kaj tio ankaŭ veras en tiu ĉi IJK-muzikalo. Ĝi sekvas la rakontojn de kelkaj partoprenantoj dum la plej

Ralf Haumer
salono **Martin Luther/ S1** (0)
mardo 4.4. post la nokta urbogvidado

granda junulara Esperanto-evento. Iuj trovos amon, iuj trovos hejmon, kaj iuj trovos neatenditan helpon! "June Kaj Kune" estas la unua muzikalo origine verkita en Esperanto publike prezentita. Tio okazis la 26-an de aŭgusto 2022 dum la 78-a IJK en Westelbeers, Nederlando.
https://www.youtube.com/watch?v=FAu6vWQbdqg
Ĉu vi interesiĝas pli pri ĝi? Legu pri tio je
June kaj Kune (muzikalo) - Vikipedio (wikipedia.org)

ĉirkaŭ 21:00

F3 La triopo de Belvill
Adoptita fare de lia avino, sinjorino Souza, Ĉampion' estas soleca knabeto. Rimarkante ke la knabo neniam estas pli feliĉa ol sur biciklo, sinjorino Souza sekvigas lin rigoran trejnadon. Jaroj pasas kaj Ĉampion' iĝas inda je sia nomo. Nun li pretas eniri la mondfaman biciklan vetkuron, la Tour the France.
desegna filmo, tamen kelkaj timigaj scenoj por tre junaj.
(2003, Francio, desegnofilmo, 70min)

salono **Philipp Melanchthon/ S5** (1)
mardo 4.4. post la vespera programo

F4 La Poŝtisto
itala romantika filmo
Poŝtisto kiu havas nur unu klienton-poeton en krome analfabeta vilaĝo, petas helpon ŝteli la koron de samvilaĝaninon.
(1994, Italio, 108min)

salono **Philipp Melanchthon/ S5** (1)
merkredo 5.4. post la vespera programo

F5 Nynke
Dramo | Vera historio pri geedziĝo inter politikisto/poeto kaj verkistino.
(2001, Nederlando, 110min) duone en la frisa

salono **Philipp Melanchthon/ S5** (1)
ĵaŭdo 6.4. post la vespera programo

F6 Ĉiu fama
Patro provas antaŭenigi la artistan karieron de sia filino
Komedio (2000, Belgio, 137min)

salono **Philipp Melanchthon/ S5** (1)
vendredo 7.4. post la vespera programo

F7 Totoro

La 11-jaraĝa knabino Sacuki kune kun sia 4-jara fratino Mej kaj ilia patro translokiĝas al domo en la kamparo. La du knabinoj kutimiĝas al nova ĉirkaŭaĵo dume malkvietante pri ilia patrino kiu ankoraŭ troviĝas en hospitalo.
La filmo rakontas delikatsente la aventurojn de la du knabinoj amikiĝante al arbaraj spiritoj kiuj vivas en grandega arbo en la najbareco.
(1988, Japanio, desegnofilmo, 86min)

salono **Martin Luther/ S1** (0)
sabato 8.4. post la vespera programo

F8 Nokto Sur Tero

5 Taksirakontoj ĉirkaŭ la mondo
Dramo/Komedio
(1991, Usono/Francio/Germanio/Japanio/Britio, 89min)

salono **Philipp Melanchthon/ S5** (1)
dimanĉo 9.4. post la vespera programo

# Gimnastikoj, Sportoj kaj Dancoj

G1 Zumba

Zumba estas konata sport-koncepto kun simple imiteblaj movoj al latinamerika kaj internacia muziko! Do, moviĝu vin kaj havu ĝojon!

Zoja Haumer
salono **Katharina von Bora/ S7** (2)
diversaj tagoj 10:45

G2 Malstreĉiga gimnastiko

Pere de gimnastiko ni fortigos malzorgitajn muskolpartojn por reatingi denove ekvilibron. Tiel ni povas plialtigi nian potencialon. La etendado kaj maletendado malstreĉas la muskolojn kaj kondukas al tuta malstreĉo kaj pli bona korpa konscio.

Anna Dupechaud
salono **Katharina von Bora/ S7** (2)
merkredo 5.4.19:00
sabato 7.4.19:00

G3 Ĉigongo

Ĉigongo estas ekzercoj, kiuj helpas malstreĉiĝi. Fantaziplenaj bildoj subtenas la koncentriĝon al la harmoniaj, molaj ekzercoj. En diversaj tagoj mi fokusiĝos je diversaj ekzercaroj: la 18 harmoniaj movoj, la 8 noblaj ekzercoj kaj la ludo de la 5 bestoj.

Birke Dockhorn
salono **Katharina von Bora/ S7** (2)
vendredo7.4. 9:00
sabato 8.4. 9:00
dimanĉo 9.4. 19:00

Ĉiu povas kunfari la movojn sendepende de la sporta kapablo. Eĉ apartajn sportvestaĵojn vi ne bezonos (sed mi ja rekomendas komfortajn vestaĵojn). Estu bonvenaj!

G4 Jogo

Hinddevena metodo de meditado kun pluraj skoloj, uzanta ekzercojn de korpa sinteno kaj spirado por estigi apartajn mensostatojn.



David Henkel
salono **Katharina von Bora/ S7** (2)
ĉiutage 7:30

# Diservoj

D1 Matena Laŭdo

Ni kantas kune kaj kristajn kaj aliajn kantojn.

Georg Weil
salono **Martin Luther/ S1** (0)
ĉiutage 7:30

D2 Paska diservo en la preĝejo

Ni vizitas la evangelian servon je la paska frumateno en la urbopreĝejo kie preĝis Luthero. Tie ni povas kanti Esperantan kanton kiun oni kantis jam dum matena laŭdo. Poste eblas matenmanĝi en la komunuma domo.

Georg Weil
ekiro dimanĉo 9.4.
je la **4:30 !!**

# Infana Programo

## Arta Manlaboro


Nickų Janssen, Georg Weil,
Zoja Haumer

salono **Lucas Cranach/ S2** (0)

Paskaj kaj printempaj manlaboroj por infanoj kaj plenkreskuloj. Ni faldas el papero, kolorigas saketojn kaj T-ĉemizojn, hoktrikas belajn aĵojn, desegnas bildetojn kaj multe pli…

ĉiutage 10:45



## Paska Ovoserĉado

Zoja, Nickų, Christoph kaj aliaj

salono **Martin Luther/ S1** (0)

Je la paska dimanĉo, tuj post la matenmanĝo, okazos granda serĉado de paskaj ovoj (kaj dolĉaĵoj) por infanoj. La paska leporo kaŝos tiujn paskaĵojn.

dimanĉo 9.4. 9:00

## Mazi-horo


Nickų Janssen

salono **Johannes Bugenhagen/ S3** (1)

Matene kutime okazas Mazi-horo: kurso por infanoj laŭ la Mazi-metodo. La infanoj spektas lecionojn de la Mazi-filmo kaj lude ekzercas la lernitaĵojn.

ĉiutage 9:00





## Piĵamaj rakontoj

Nickų Janssen

salono **Johannes Bugenhagen/ S3** (1)

En la antaŭvespera programo okazas rakontoj por la etuloj, kiuj devas enlitiĝi kaj dormi frue. Sed atentu, estas veraj piĵamaj rakontoj: oni rajtas aŭskulti nur en dorm-vestoj! ĉiutage 19:00

# Ekskursoj

La regiono de la ĉi-jara PSI estas tre alloga regiono kun abundaj eblecoj de ennaturaj ekskursoj. Wittenberg situas apud la rivero Elbe. En la regiono oni bone povas bicikli.

**Bicikloj estas haveblaj**

- **en la apuda turista oficejo po 12 € tage aŭ**
- **de la bicikla vendejo Kralisch (1km) po 9 € / 20 € kun E-motoro tage.**

Nur 20 km for estas la fama granda Wörlitz Parko por migri. En Wittenberg mem troviĝas bestoparko en la apudeco de la junulargastejo kaj je la alia flanko Luther-parko kun ludejo. Nur 2,8 km for estas la urboarbaro kun alia malgranda bestparko apud de Nabu-Centro. La malnova urbocentro de Wittenberg invitas vin por butikumi kaj kafumi in diversaj kafejoj. Krome vi povas piede viziti pli ol 8 muzeojn.
Por la ĉi-jara PSI ni denove preparis ampleksan kaj diversan ekskursan programon.
Dum ĉiu posttagmezo okazos diverskarakteraj ekskursoj:

- Ekskursoj per **publikaj trafikiloj (nomitaj Px, x=cifero)** al proksimaj urboj kiel Dessau kaj Wörlitz. La trajnhaltejo "Lutherstadt Wittenberg Altstadt" estas 10 minutoj for de nia junulargastejo.
- Ekskursoj en Wittenberg per piedoj **(nomitaj Wx, x=cifero).**
- Piedaj ekskursoj tra la naturo **- Migradoj (nomitaj Mx, x=cifero)**.

Kiel dum la pasintaj PSI-renkontiĝoj ni aranĝas la pli longajn ekskursojn kaj la ekskursojn dum festtagoj per **privataj aŭtomobloj (nomitaj Ax, x=cifero)** de la partoprenantoj. Kompreneble tio limigas la nombron de la haveblaj lokoj, ĉar ĝi dependas de la preteco de la ŝoforoj kunporti aliajn. Tio konkrete signifas, ke ni ne povas garantii al ĉiuj personoj la partoprenon en ĉiu dezirata ekskurso. Krom tio la ĝentileco kompreneble postulas, ke vi laŭ viaj kapabloj libervole finance subtenu la ŝoforon – aŭ rekte aŭ poste vespere en la trinkejo. Ni volonte informos vin pri alternativoj, kiujn vi meminiciate povas entrepreni. Ni rekomendas aparte:

| | |
|---|---|
| W 9 | Wikana keksfabriko en Wittenberg (20-30 min piede), malmultekosta |
| W10 | Melanchtonmuzeo (20 min piede), interesa por infanoj |
| W11 | Cranachmuzeo (20 min piede) |
| W12 | Kastelmuzeo (5 min piede), libraro por la historio de reformacio |
| W 13 | Futurea Science Center: interaktiva ekspozicio pri nitrogeno (merkato) |
| A 5 | Naĝejo en Piesteritz (eblas kun trajno), estas malgranda |
| A 6 | Ripoznaĝejo Woliday en Wolfen (50km-50min.) |
| A7 | Torgau (30km): Dornröschenfabelo de MDR, bela urbocentro kun butikoj |

## Mardo, 4-a de aprilo 2023 / **Wittenberg-tago**

**14:00 W1 orientgermana historia muzeo** en urbocentro de Wittenberg (piede 10 minutoj)**:**




10 € / 8 € por lernantoj, studentoj kaj handikapuloj (inkluzivas fotopermeson por 2 €).
Ekde 10 homoj oni pagas nur 8,50 €.
Infanoj ktp malpli - www.pflug-ev.de.
Estas ŝtuparoj **sen lifto(!)**. La ekspozicio etendiĝas super tri etaĝoj. La muzeo montras kiamaniere oni vivis en Wittenberg inter 1920 kaj 1990. Estas malnovaj loĝejoj kaj eĉ resto de infanĝardeno kaj vendejo. Oni trovas multe da originalaj tipaj aferoj de la epoko de GDR: mebloj, kuirilaro, ludiloj, nutraĵoj, fotoj ktp.

**W2** Vi povas grimpi sur la **kastelturon**. Eblas eniri inter 10:00 – 15:00.
Lasta eniro estas je 14.30. Kostas 3 € / 2 €. Infanoj sub 3 jaroj estas senpagaj.
La enirmoneron vi ricevas en la preĝejo de la kastelo aŭ en la turista oficejo sur la alia flanko de la strato. La turo estas 88 metrojn alta kaj havas 289 ŝtupojn.

Krome vi povas uzi la **turistan trajneton** por urbrondveturado de unu horo. Vi preterpasas la "Hundertwasserlernejon". La trajno haltas en la malnova urbo kaj vi rajtas eliri kaj eniri denove. Oni klarigas la vidindaĵojn.
Posttagmeze eblas je 13.15, 14.30 kaj 16.00.
Kostas 12 € / 11 € kaj 5 € por infanoj.
Por la familio kun 2 infanoj vi pagas 30 €. Ekde 20 personoj kostas 11 €.
www.altstadtbahn.de (foto:https://de.wikipedia.org/wiki/Haus_der_Geschichte_Wittenberg)

**19:30 – 20:30 W3 nokta gvidado tra Wittenberg** kun noktogardisto: 15 € / 10 € por lernantoj ktp. - https://lutherstadt-wittenberg.de/planen-buchen/stadtfuehrungen/detail/es-war-einmal-in-wittenberg



Wittenberg estas urbo kun granda historio. La noktogardisto rakontos multe da anekdotoj en historia vestaĵo. Fine vi ricevos trinkaĵon.

## Merkredo, 5-a de aprilo 2023 / **Bauhaus-tago**



**9:00 tuttaga Bauhaus-ekskurso al Dessau**
per trajno (45 km)
Dum la tuttaga ekskurso ni vizitos la faman **Bauhaus-urbon Dessau.** La Bauhaus (esperante konstrudomo) estas la plej fama arto-, dezajno- kaj arkitekturlernejo de moderna arto en Germanio. Tre fama estas la teksado. La principo estis "formo sekvas funkcion" (https://eo.wikipedia.org/wiki/Bauhaus_Dessau).

La Bauhaus fondiĝis en 1919 en Weimar, en la domo de la antaŭa artlernejo Weimar. En 1925 la Bauhaus translokiĝis al Dessau, kie ĝi ekde 1926 situis en propra konstruaĵo nomata Bauhaus Dessau. En 1932 la Bauhaus devis translokiĝi al Berlino. Tie ĝi finis sian agadon en 1933 (https://eo.wikipedia.org/wiki/Bauhaus).

Kostoj:
La trajnbileto kostas 12 € po persono, se estas grupbileto.
Infanoj ekde 6 jaroj pagas por la trajnbileto malpli.
La kostoj dependas de la grupgrandeco.
Entute kostas kun unu gvidado 9 € kaj kun du gvidadoj 18 €.
La prezo de la gvidadoj denove dependas de la grupgrandeco.
Senpage en Bauhaus estas homoj sub 18 jaroj kaj homoj kiuj ricevas ALG 2. Ili ankaŭ ne devas pagi por la gvidado.
Por uzi la aŭtobuson oni pagos krome surloke en Dessau.
Ekzistas Bauhaus-linio 10 kiu portas vin al la tutajn Bauhaus-domojn.
Unudirekta bileto kostas 1,80 € / 1,40 €, tuttaga bileto 5 € / 3,70 €.
Ĉiukaze en Dessau vi devas multe marŝi.



Detaloj:
Ni foriros je **9:00** matene. Ni atingos Dessau trajne 9:49. Post 15 minutoj piede ni atingos Bauhaus-lernejon. Je **10:30** ni povas viziti la originalan Bauhaus-lernejon per **gvidado** (**P1**). Poste okazos la **gvidado** (**P2**) tra la "majstro-domoj" (en la germana: Meisterhäuser) je **11:40**. Estas nur 10 minutoj for de la lernejo. Ili estis konstruitaj de Walter Gropius 1925-26 kiel modeloj por moderna loĝado por la majstroj de Bauhaus: Gropius, Klee, Kandinski, Muche, Schlemmer kaj Feininger (https://eo.wikipedia.org/wiki/Bauhaus).



Poste estas tempo por ripozi kaj kafumi au tagmanĝi en la kafejo de la Bauhaus-lernejo aŭ en la fama **Bauhaus-kafejo Kornhaus** (grajndomo), starigita en 1929/1930, apude de la rivero Elbe, atingebla pere de buso linio 10 de ia Bauhaus haltejo. (https://de.wikipedia.org/wiki/Kornhaus_(Dessau)).




Dum la venonta **gvidado** (**P3**) je **14:00** la Esperantisto Christoph Mordziol gvidas nin tra la ekologiajn konstruaĵon de la **Federacia Media Agentejo (Umweltbundesamt)**, kio situas en la apudeco de la stacidomo. Li mem laboras tie.

La Federacia Media Agentejo Dessau estas kompakta, tre granda oficeja komplekso, kio estas konstruita ekde 2005. Estas multaj elementoj integritaj en la konstruaĵo, kiuj helpas ŝpari energion. Ekzemple, partoj de la konstruaĵo estas integritaj en grandan luma korto kun tegmento. La ŝarkdento-tegmento sur la luma korto havas sunajn ĉelojn sur la plata angula flanko je la suda flanko. Ĉi tio permesas ke multe da suno brilas sur la sunajn ĉelojn. Je la kruta norda angula flanko estas vertikalaj fenestroj. Ili enlasas multe da taglumo en la domon, sed neniu rekta sunlumo. Tiam ĝi ne tro varmegos en la somero.

Per https://www.youtube.com/watch?v=_3601dTNWNU kaj https://www.youtube.com/watch?v=fpBld_LdaQw oni povas vidi filmojn pri la konstruaĵon.



Posttagmeze eblas viziti memstare ankaŭ la Bauhaus-setlejon **"Törten"** kun la Konsumgebäude (dekstren, speco de ĉirkaŭkonstruita vendsalonego). Estiĝis en Törten en la nuna sudo de Dessau de 1926 ĝis 1928 setlejo kun 314 vicdomoj en la stratoj Großring, Mittelring kaj Kleinring kaj ek 1930 la **Laubengang-domoj** (dekstren) en la stratoj Mittelbreite kaj Peterholzstraße en industria konstrumaniero. La dezajno de Törten enkalkulis gravajn opiniojn de la arkitektoj de la Bauhaus, kiel ekzemple la sunradiadon dum diversaj taghoroj kaj sezonoj, la vivmanieron en la loĝejo kaj la utiligon de la





apudaj ĝardenoj por nutraĵo kaj ripozo. Oni transformis tion, kion Walter Gropius jam esprimis: "konstruado estas la formigo de vivprocesoj". Per la industria konstrumaniero oni atingis malaltajn kostojn, kiuj estis por la aĉetantoj elirvojo el la altiĝantaj luprezoj kaj eblo iĝi posedanto de domo. Sed pro la plataj tegmentoj la domoj estis multe kritikataj de konservemuloj (https://eo.wikipedia.org/wiki/Bauhaus).

**La trajno hejmen forveturos je 17:32 de stacidomo Dessau kaj alvenos en Wittenberg Altstadt je 17:52.**

15:00 **W4 Alaris papilia parko** en Wittenberg-Piesteritz
Distanco: 6km https://www.schmetterlingspark-wittenberg.de Estas bushaltejo antaŭe.
La oranĝerio havas 1.000 m². Vi povas observi pli ol 140 diversajn speciojn da papilioj inter tropikaj plantoj. Por intertempe ripozi estas kafejo ene kaj ekstere.

Enirprezoj: 9,90 € / 6,50 € ;
Infanoj ekde 3 jaroj ĝis 1,45 m: 6,50 € ;
grupo ekde 20 personoj: 8,50 €.
Taga bileto por aŭtobuso kostas 2,90 € / infanoj 2,40 €.

## Ĵaŭdo, 6-a de aprilo 2023 / **Wörlitz-tago 1**

**13:00 P4 buse al Wörlitz** **buse reen 16:51** Wörlitz haltejo "Neue Reihe"
**13:30 A1 aŭte al Wörlitz**

**Al la plej konataj vidindaĵoj apud Wittenberg apartenas la parko de Wörlitz.**
Ĝi apartenas al la mondaj heredaĵoj de UNESCO kaj estis kreita inter 1760 kaj 1800. Kiam la juna Princo Leopold Friedlich Franz III transprenis la regadon en sia landeto Dessau-Anhalt li reformis la ekonomion, konstruis modernan stratsistemon, enkondukis devigan viziton al lernejoj kaj klopodis pri klerigado de siaj civitanoj. Parto de la kleriga projekto estis la konstruo de grandaj publikaj parkoj, kiuj komune estas konataj kiel la Wörlitz-ĝardena reno, kies plej elstara parko estas tiu en Wörlitz, 20 km apud Wittenberg. La parko estas laŭ angla stilo, do kvazaŭ komponita naturo kun multaj elementoj kiel diversaj temploj kaj pontoj. Lasu vin surprizi, ni promenos 2-3 horojn tra la parko.
La vizito de la parko estas senkosta,
nur por la **prametojn** en la parko ni devas pagi:
bileto por plenkreskuloj **1 € / 0,50 €**.



Oni rajtas suprengrimpi la turon de la preĝejo (Bibelturm). Tie vi havas bonan superrigardon de la parko (**4 € / 3 €**)



Oni povas lasi sin remi tra parto de la parko (45 min.)
**12** € / **3** € sub 16j, **necesas mendi rete**
https://woerlitzer.com/home/gondelfahren-im-worlitzer-park

La hodiaŭa (ĵaŭda) ekskurso okazos tra la okcidenta parto de la parko, la dua (sabata) ekskurso en la orienta parto kaj inkluzivas la insulon Stein.

La taga **aŭtobusa bileto al Wörlitz** kostas **9,20** € / **7,60** € (infanoj 6-16j.).




Eblas ankaŭ veturi al Wörlitz per muzea fervojo de Dessau kaj reiri per la aŭtobuso al Wittenberg. Tiam restas nur unu horo en Wörlitz.

Kostas entute 18,30 €/ 13,10 €.

https://www.dvv-dessau.de/verkehr/fahrplan-woerlitzer-eisenbahn/ (Foto: Georg Weil)

15:00 **W5 bestoparko en Wittenberg**
(10 minutoj piede de nia PSI-ejo)
La parko estis fondita en 1928, havas totalan areon de 5.064 m² kaj estas la plej malgranda zoologîa gardeno en Germanio. Vi povas vidi akvarion kun malvarma akvo kun 25 diversaj fiŝpecioj de la regiono Elbe-Elster. Krome 15 specioj de mambestoj (inter alie simioj kaj gnomoj) kaj pli ol 20 specioj de birdoj. Infanoj amas karesi kaprojn, ŝafojn kaj kuniklojn. Estas senpaga.

## Vendredo, 7-a de aprilo 2023 / **FridaysForFuture-tago**

**14:00 A2 Ferropolis gvidado: 11,50** € www.ferropolis.de
Ekskurso per aŭtomobiloj al iama brunkarba minejo (24km - 30min.)



**14:00 – 15:00 W6 Panoramo Wittenberg: 16** € www.wittenberg360.de(1,2 km)



La bildoj en la ronda Panaramo (360°) estis pentritaj de Yadegan Asisi. Ili montras Wittenberg en la tempo, kiam Martin Luther kaj Lukas Cranach vivis tie. La ĉefaj lokoj estas la kastelpreĝejo kaj la placo antaŭ ĝi. Vi povas ĉeesti, kiam Martin Luther pendigis la 95 tezojn al la pordo de la preĝejo. Per la rakontoj kun lum- kaj sonefektoj, vi povas travivi unu tagon kaj unu nokton en la mezepoko. Poste vi povas viziti la domon de Luther, kiun oni atingas piede (ĉ. 10 minutoj). Apud la Luthermuzeo troviĝas kafejo por ripozi.



**16:00 – 17:00 W7 Lutherhaus: 11** € (1 km)
www.lutherstadt-wittenberg.de
En tiu ĉi domo de Luther li vivis ekde sia alveno en Wittenberg 1508. Ekde 1525 li vivis tie kun sia edzino Katharina von Bora kaj sia familio. Oni povas vidi pli ol 1.000 eksponaĵojn.

## Sabato, 8-a de aprilo 2023 / **Wörlitz-tago 2**

**Wörlitz-tago 2**
**12:45 P5 bicikle al Wörlitz** (45km entute apude de Elbe)
**13:00 P6 buse al Wörlitz** **buse reen 16:51** Wörlitz haltejo "Neue Reihe"
**13:30 A3 aŭte al Wörlitz**
https://www.welterbe-gartenreich.de



Rigardu sub Ĵaŭdo. La dua ekskurso dum sabato montros vin la orientan parton inkluzive de la insulo Stein

Sen gvidado: 6 € / 5€/ Infanoj sub 16j. senkoste.

La taga **aŭtobusa bileto al Wörlitz** kostas **9,20** € / **7,60** € (infanoj 6-16j.). Daŭras unu horo per aŭtobuso.

**13:00 P7 bicikla ekskurso al Coswig** apude de la belega rivero Elbe:
https://www.coswig.de/de/sehenswertes.html
(unu vojo 15 km),
reen bicikle aŭ trajne (3,90 € /2,30 €, bicikloj senpage en trajno).
La trajno foriros je 17:29 en Coswig.
La luado de unu biciklo kostas 12€.
En Coswig eblas kafumi aŭ viziti preĝejon aŭ muzeon.



Foto: https://de.wikipedia.org/wiki/Coswig_(Anhalt)#/media/Datei:Coswig(Anhalt),Elbe,Schloss.jpg

**14:00 – 15.00**
**W8 vizitado de bierfarejo: 13** € (500m)
www.brauhaus-wittenberg.de
La belaj konstruaĵoj de la bierfarejo ekzistas ekde 1480. Vi povas gustumi 3 diversajn memfaritajn bierojn.



## Dimanĉo, 9-a de aprilo 2023

**14.00 Industri- kaj filmmuzeo Wolfen 5** €/ **2,50** € (50 km – 50 min)
www.ifm-wolfen.de
Estas ekskurso per aŭtomobiloj al iama fabriko por produkti filmkartoĉojn.
La **gvidado** (**A4**) komenciĝas per la Agfa-reklam-filmo el la jaro 1960 " Filmo kaj Fibro" (20 min.)
Poste sekvas gvidado tra la ekcpozicio "filmproduktado" (daŭro ĉ. 60 min). Krom tio ĉi tie troviĝas la plej granda publika ekspozicio de pli ol 800 fotoaparatoj.
Grupo ek de 10 personoj aŭ famila bileto: 2,50 € po persono.



**13.30 -16.30 bicikla ekskurso al la ĝardenurbeto Piesteritz:** (entute 12 km)
La **gvidado** (**P8**) kostas **13** €,
la luado de unu biciklo kostas **12** € pli.
La ĝardenurbeto Priesteritz (400 domoj) estis konstruita 1916 por ke la 2000 laboristoj de la urba nitrogena fabriko havu propran loĝdomon kun ĝardeno. Tiamaniere oni povis varbi ilin labori tie.



Tia ĝardenurbeto estas sen aŭtomobiloj. En Priesteritz tiam estis kaj ankoraŭ estas unu de la plej grandaj nitrogenaj fabrikoj en Germanio (https://de.wikipedia.org/wiki/Piesteritz).

# Vespera Programo

salono **Martin Luther/ S1 (0)**

| | |
|---|---|
| lundo 3.4. | enkonduka prezentado de la programo poste interkona vespero |
| mardo 4.4. | filmo de TEJO "June Kaj Kune" |
| merkredo 5.4. | koncerto de Feri Floro  |
| ĵaŭdo 6.4. | mezepoka kostuma balo<br>Venu danci kaj amuziĝi! |
| vendredo 7.4. | Drakofajro<br>pupteatraĵo<br>de<br>Christoph Frank  |
| sabato 8.4. | paska fajro ekstere, kun bastonpano kaj kantado<br>paska nokta diservo |
| dimanĉo 9.4. | Internacia Vespero<br>kun kontribuoj de **vi**, la partoprenantoj<br>Bonvolu anonci vin ĉe **Ralf Haumer** |

# Listo de Partoprenantoj

27-a de marto 2023

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. | Aoshima, Mariko | Hamburgo, Germanio | mardudu@web.de |
| 2. | Aulbach, Linus | Berlin, Germanio | |
| 3. | Boen, Katja | Lambersart, Francio | boencathie@hotmail.fr |
| 4. | Brandenburg, Barbara | Berlin, Germanio | |
| 5. | Brandenburg, Ulrich | Berlin, Germanio | ulrichjbrandenburg@yahoo.de |
| 6. | Brücker, Christine | duisburg, Germanio | christine.duisburg@gmx.de |
| 7. | Brücker, Margret | Kruft, Germanio | margret.kruft@gmx.de |
| 8. | Brümmer, Waltraut | Hessisch Oldendorf, Germanio | bruemmerho@posteo.de |
| 9. | Buhr, Heike | Hannover, Germanio | heikebuhr@t-online.de |
| 10. | Büsch, Tammy | Schossin, Germanio | birke.dockhorn@gmail.com |
| 11. | Chikato, Jutta | Buxtehude, Germanio | jutta.chikato@t-online.de |
| 12. | Diemel, Andreas | Duisburg, Germanio | andreas.diemel@web.de |
| 13. | Diestel, Miro | Leipzig, Germanio | johannes@steloj.de |
| 14. | Diestel, Wolfram | Leipzig, Germanio | wolfram@steloj.de |
| 15. | Dockhorn, Birke | Schossin, Germanio | birke.dockhorn@gmail.com |
| 16. | Dreyer, Fred | Mülsen, Germanio | |
| 17. | Dreyer, Olga | Mülsen, Germanio | olgazwickau@ukr.net |
| 18. | Dückershoff, Petra | Bochum, Germanio | petra.dueckershoff@esperanto.de |
| 19. | Dupechaud, Anna | Lambersart, Francio | anne.dupechaud@gmail.com |
| 20. | Ebel, Elias | Willingen (Ulpand), Germanio | |
| 21. | Ebel, Ilona | Willingen (Upland), Germanio | |
| 22. | Ebermann, Paŭlo | Berlin, Germanio | |
| 23. | Frank, Christoph | Rottweil, Germanio | zauberbuehne@t-online.de |
| 24. | Frank, Ines | Rottweil, Germanio | zauberbuehne@t-online.de |
| 25. | Frense, Dieter | Heilbad Heiligenstadt, Germanio | dieter.frense@web.de |
| 26. | Frense, Marika | Heilbad Heiligenstadt, Germanio | marika.frense@gmail.com |
| 27. | Gabalda, Floreal | La Norville, Francio | liba.gab@gmail.com |
| 28. | Gabalda, Liba | La Norville, Francio | liba.gab@gmail.com |
| 29. | Gersonde, Jörg | Köthen (Anhalt), Germanio | jgersonde@gmail.com |
| 30. | Gliniak, Tatiana | Piaseczno, Polen | tatiana.gliniak@soswwp.edu.pl |
| 31. | Godivier, Mathilde | Pleugueneuc, Francio | |
| 32. | Godivier, Xavier | Pleugueneuc, Francio | xgodivier@esperanto.org |
| 33. | Grasso, Jessica | Berlin, Germanio | |
| 34. | Grumbach, Andrea | Groß-Gerau, Germanio | leonineto@web.de |
| 35. | Grumbach, Jonas | Groß-Gerau, Germanio | |
| 36. | Guinard, Theresa | Berlin, Germanio | tguinard@gmail.com |
| 37. | Guyot Müller, Lino | Seligenstadt, Germanio | |
| 38. | Guyot, Tony | Seligenstadt, Germanio | tguyot@yahoo.com |
| 39. | Haumer, Katharina | Schneeberg, Germanio | katharinah3110@gmail.com |
| 40. | Haumer, Marietta | Kahla, Germanio | mariettah007@gmail.com |
| 41. | Haumer, Ralf | Zwickau, Germanio | ralf.haumer@esperanto.de |
| 42. | Haumer, Zoja | Zwickau, Germanio | esperanto@razokama.de |
| 43. | Henkel, David | Braunichswalde, Germanio | phuongnguyen.ibk@gmail.com |
| 44. | Henkel, Flama | Braunichswalde, Germanio | phuongnguyen.ibk@gmail.com |
| 45. | Henkel, Lio | Braunichswalde, Germanio | phuongnguyen.ibk@gmail.com |
| 46. | Hothum, Silke | Aspisheim, Germanio | silke.hothum@outlook.de |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 47. | Humet, Alex | Berchem, Belgio | alex.humet@yahoo.com |
| 48. | Huthmann, Christel | Wahrenbrück, Germanio | chuthm@web.de |
| 49. | Huthmann, Dirk | Wahrenbrück, Germanio | DHuthmann@web.de |
| 50. | Jacques, Gerd | Antwerpen, Belgio | gerd@esperanto.be |
| 51. | Jacques, Ilse | Antverpena, Belgio | ilse.jacques@esperanto.be |
| 52. | Jäger, Hans | Lutherstadt Eisleben, Germanio | marimor574@gmail.com |
| 53. | Janssen, Nicky | Wommelgem, Belgio | nicky24@telenet.be |
| 54. | Keetlaer, Rob | Best, Nederlando | |
| 55. | Knapp, Gitta | Schossin, Germanio | birke.dockhorn@gmail.com |
| 56. | Könne, Ralf | Bochum, Germanio | |
| 57. | Koß, Christa | Chemnitz, Germanio | CH_SZK@t-online.de |
| 58. | Kranz, Brigitte | Oldenburg, Germanio | brigitte-kranz@web.de |
| 59. | Krieghoff, Stefan | Oldenburg, Germanio | stefan@krieghoffs.de |
| 60. | Kruse, Franz | Lemwerder, Germanio | franz.kruse@esperanto.de |
| 61. | Kuhl-Kruse, Elisabeth | Lemwerder, Germanio | elisabeth.kuhl-kruse@esperanto.de |
| 62. | Kühnel, Peter | Berlin, Germanio | recicluskuehnel@gmx.de |
| 63. | Langholf, Birk | Hemslingen, Germanio | |
| 64. | Langholf, Esther | Hemslingen, Germanio | |
| 65. | Lassika, Sylvia | Magdeburg, Germanio | trennelassika@mdcc-fun.de |
| 66. | Leyk, Dawid | Łoś, Polen | |
| 67. | Leyk, Jerzy | Łoś, Polen | jerzy.leyk@op.pl |
| 68. | Leyk, Karol | Łoś, Polen | |
| 69. | Lies, Elke | Osterholz-Scharmbeck, Germanio | elke.lies@t-online.de |
| 70. | Loose, Gisela | Holzwickede, Germanio | lupiro@t-online.de |
| 71. | Loose, Wolfgang | Holzwickede, Germanio | lupiro@t-online.de |
| 72. | Loose-Vanyushkin, Britta | Stuttgart-Möhringen, Germanio | Britta.Loose@mail.ru |
| 73. | Menzel, Christiane | Schwerte, Germanio | christiane.menzel@gmx.de |
| 74. | Menzel, Jascha | Schwerte, Germanio | jascha.menzel@gmx.de |
| 75. | Menzel, Noah | Schwerte, Germanio | |
| 76. | Menzel, Tobias | Schwerte, Germanio | tobi.menzel69@gmx.de |
| 77. | Mišeikytė, Rasa | Elstertrebnitz, Germanio | rasike@gmx.de |
| 78. | Mobunga Monka, Patricia | Kinshasa, Kongo | |
| 79. | Müller, Aike | Seligenstadt, Germanio | aikkem@yahoo.de |
| 80. | Nitsche, Christian | Berlin, Germanio | nitsche@tutanota.com |
| 81. | Penno, August | Antverpeno, Belgio | |
| 82. | Penno, Linus | Antverpeno, Belgio | |
| 83. | Penno, Timm | Antverpeno, Belgio | timmxy@arcor.de |
| 84. | Plötner, Helga | Gräfenhainichen, Germanio | helga.ploetner@gmx.de |
| 85. | Pohl, Heide | Zahna - Elster, Germanio | heide.pohl@alice.de |
| 86. | Roemer, Gerald | Hamburgo, Germanio | geroemer@t-online.de |
| 87. | Roth, Barbara | Berlin, Germanio | babaroth@web.de |
| 88. | Rumrich, Inge | Maintal, Germanio | klaus.rumrich@gmx.de |
| 89. | Rumrich, Klaus | Maintal, Germanio | klaus.rumrich@gmx.de |
| 90. | Schlesinger, Constanze | Leipzig, Germanio | schlesinger@steloj.de |
| 91. | Sözüer, Lars | Balgach, Svislando | Lars.duisburg@gmx.de |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 92. | Teske, Edlyn | Leipzig, Germanio | edlyn.teske@gmail.com |
| 93. | Trenne, Manfred | Magdeburg, Germanio | trennelassika@mdcc-fun.de |
| 94. | Tytgat, Ite | Berchem, Belgio | Ite.tytgat@gmail.com |
| 95. | Van de Velde, Jelle | Wilrijk, Belgio | lodchjo@yahoo.com |
| 96. | Van de Velde, Lode | Wilrijk, Belgio | lodchjo@yahoo.com |
| 97. | Vanyushkin, Konstantin | Stuttgart, Germanio | |
| 98. | Vanyushkin, Sascha | Stuttgart, Germanio | |
| 99. | Viertel, Kerstin | Muldestausee, Germanio | kerstinviertel@web.de |
| 100. | Virag, Ferenc | Kleinwallstadt, Germanio | ferifloro@gmail.com |
| 101. | Weber, André | Schwerin, Germanio | ACW.Esperanto@mailbox.org |
| 102. | Weemeyer, Anton | Hannover, Germanio | carolinverena@gmail.com |
| 103. | Weemeyer, Carolin | Hannover, Germanio | carolinverena@gmail.com |
| 104. | Weemeyer, Helena | Hannover, Germanio | carolinverena@gmail.com |
| 105. | Weemeyer, Robert | Hannover, Germanio | robert.weemeyer@gmail.com |
| 106. | Weidner, Karin | Igersheim, Germanio | kaweischi@web.de |
| 107. | Weil, Georg | Hannover, Germanio | heikebuhr@t-online.de |
| 108. | Weil, Paula | Stuttgart, Germanio | paula.weil@esperanto.de |
| 109. | Wennergren, Bertilo | Schossin, Germanio | bertilow@gmail.com |
| 110. | Werner, Amelia | Elstertrebnitz, Germanio | rasike@gmx.de |
| 111. | Werner, Eduard | Elstertrebnitz, Germanio | edi.werner@gmx.de |
| 112. | Werner, Julius | Elstertrebnitz, Germanio | rasike@gmx.de |
| 113. | Wunsch-Rolshoven, Lu | Berlin, Germanio | lu.esperanto@gmx.de |

…eble pliaj…

La PSI-teamo kaj Germana Esperanto-Asocio dankas al la Familio-Fischer-fondaĵo pro subtenado de partoprenantoj kaj ankaŭ dankas al Eŭropa Unio, kiu per la programo Erasmus+ subtenis la inviton de eksterlandaj spertuloj.

Erasmus+

# Helmut Klünder

# (1948 – 2022)



En aĝo de preskaŭ 74 jaroj forlasis nin Helmut Klünder, matematikisto, iama prezidanto de Germana Esperanto-Junularo (1970-1974) kaj de Germana Esperanto-Asocio (1983-1989).

Li estis denaska esperantisto kaj de la komenco de sia vivo li aperis en Esperantujo kaj forte laboris por plifortigi kaj disvastigi Esperanton, aparte en Germanio.

Li partoprenis sennombrajn aranĝojn, laste la Germanan Esperanto-Kongreson 2022. Per siaj ideoj kaj per sia karaktero, li grave influis la mondon esperantan. Dum la multaj jaroj kiel prezidanto de GEA, li kunfondis du Esperanto-renkontiĝoj, la Printempa Semajno Internacia (PSI) kaj la Internacia Festivalo (IF). Ĝis lia forpaso, li ĉiam estis konsilanto kaj partoprenanto de PSI. Dum PSI li organizis la tradician knajpon kun i. a. multaj diversspecaj bieroj de la regionoj en kiuj okazis la Paska renkontiĝo. Li ankaŭ subtenis multajn homojn partopreni diversajn Esperanto-aranĝojn pere de la fondaĵo memore al sia edzino Elisabeth.


Per lia forpaso, ni perdis ne nur amikon sed ankaŭ gravan personon de kaj por Esperanto.

Niajn sincerajn kondolencojn al lia filino Laŭra kaj al Anna Dupechaŭd, kiu lin akompanis dum liaj lastaj jaroj.

La PSI – teamo
Zoja kaj Ralf Haumer
Stefan Krieghoff
Heike Buhr und Georg Weil

# PSI-historio

| n-ro | jaro | loko | partoprenantoj | organizantoj |
|---|---|---|---|---|
| 1 | 1985 | Bielefeld | 35 | fam. Kruse |
| 2 | 1986 | Wetzlar | 55 | fam. Fischer |
| 3 | 1987 | Rastatt (kun 65-a GEK) | 66 | fam. Fischer |
| 4 | 1988 | Jünkerath | 58 | fam. Fischer |
| 5 | 1989 | Hopsten | 63 | fam. Fischer |
| 6 | 1990 | Todtmoos | 72 | fam. Fischer |
| 7 | 1991 | Jünkerath | 115 | fam. Bohr, Loose |
| 8 | 1992 | Bad Neuenahr-Ahrweiler | 112 | fam. Bohr, Loose |
| 9 | 1993 | Hilders-Oberbernhards | 136 | fam. Bohr, Loose |
| 10 | 1994 | Jünkerath | 144 | fam. Bohr, Loose |
| 11 | 1995 | Waldfischbach-Burgalben | 111 | fam. Bohr, Kruse, Sona |
| 12 | 1996 | Duderstadt (kun 2-a PLI) | 136 | fam. Bohr, Kruse, Sona, Loose |
| 13 | 1997 | Duderstadt | 149 | fam. Bohr, Kruse, Sona, Loose |
| 14 | 1998 | Bonn | 148 | fam. Bohr, Kruse, Sona, Loose |
| 15 | 1999 | St. Andreasberg | 159 | fam. Bohr, Kruse, Sona |
| 16 | 2000 | St. Andreasberg | 161 | fam. Bohr, Kruse, Sona, Kranz, Krieghoff |
| 17 | 2001 | St. Andreasberg | 160 | fam. Bohr, Kruse, Kranz, Krieghoff, Klünder |
| 18 | 2002 | Waldfischbach-Burgalben | 169 | fam. Bohr, Kruse, Kranz, Krieghoff, Klünder, Gersonde, Böhm |
| 19 | 2003 | Bonn | 173 | fam. Bohr, Kruse, Kranz, Krieghoff, Klünder, Gersonde, Böhm |
| 20 | 2004 | Duderstadt | 132 | fam. Bohr, Frense, Gersonde, Klünder, König, Krieghoff |
| 21 | 2005 | Mücke | 122 | fam. Bohr, Böhm, Brücker/Sözüer, Buhr, Frense, Gersonde, Klünder, König |
| 22 | 2006 | St. Andreasberg | 172 | fam. Bohr, Böhm, Brücker/Sözüer, Buhr, Frense, Gersonde, Klünder |
| 23 | 2007 | Bonn | 160 | fam. Brücker/Sözüer, Buhr/Weil, Frense, Gersonde, Klünder |
| 24 | 2008 | Waldfischbach-Burgalben | 167 | fam. Böhm, Brücker/Sözüer, Frense, Gersonde, Klünder, Rosenstock |
| 25 | 2009 | St. Andreasberg | 176 | fam. Böhm, Bücker/Sözüer, Buhr/Weil, Frense, Gersonde, Klünder |



# PSI-historio

| n-ro | jaro | loko | partoprenantoj | organizantoj |
|---|---|---|---|---|
| 26 | 2010 | St. Andreasberg | 157 | fam. Böhm, Brücker/Sözüer, Buhr/Weil, Frense, Gersonde, Klünder, Rosenstock |
| 27 | 2011 | Waldfischbach-Burgalben | 114 | fam. Böhm, Brücker/Sözüer, Buhr/Weil, Frense, Gersonde, Klünder, Rosenstock |
| 28 | 2012 | Bonn | 120 | fam. Buhr/Weil, Dückershoff, Frense, Gersonde, Klünder, Sawitzki |
| 29 | 2013 | St. Andreasberg | 78 | fam. Bohr, Buhr/Weil, Dückershoff, Frense, Gersonde, Haumer, Klünder, Sawitzki |
| 30 | 2014 | Xanten | 97 | fam. Buhr/Weil, Diemel, Dückershoff, Frense, Haumer, Klünder, Sawitzki |
| 31 | 2015 | Winterberg | 128 | fam. Brücker/Sözüer, Diemel, Dückershoff, Haumer, Klünder, Krick, Sawitzki |
| 32 | 2016 | Bad Hersfeld | 99 | fam. Buhr/Weil, Dückershoff, Haumer, Klünder, Sawitzki |
| 33 | 2017 | Essen | 87 | fam. Buhr/Weil, Dückershoff, Haumer, Klünder, Sawitzki |
| 34 | 2018 | Plauen | 109 | fam. Buhr/Weil, Haumer, Klünder, Sawitzki |
| 35 | 2019 | Hochspeyer | 75 | fam. Buhr/Weil, Haumer, Klünder, Krieghoff |
| 36 | 2020 | Wittenberg NULIGITA | | fam. Buhr/Weil, Haumer, Klünder, Krieghoff |
| 37 | 2021 | RETE | | fam. Buhr/Weil, Haumer, Klünder, Krieghoff |
| 38 | 2022 | RETE | | fam. Buhr/Weil, Haumer, Krieghoff |
| **39** | **2023** | **Wittenberg** | **113** | **fam. Buhr/Weil, Haumer, Krieghoff** |
| 40 | 2024 | Bayreuth | ? | fam. Buhr/Weil, Haumer, ????? |

